# NIA PONTO


| | |
|---|---|
| Grupo Esperantista | Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.) |
| Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre | ☎ 619.694.683 (Iciar) |
| 48005-BILBAO (Hispanio) | ☎ 658.709.087 (Jesús) |
| Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) | esperantobi@gmail.com |

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MARTO/APRILO 2014** **Nro. 99 (2/14)**


## ASAMBLEA GENERAL ANUAL.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 23 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2013.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2014.
4. Nombramiento de nueva Junta Directiva.
5. Informaciones varias.
6. Ruegos y preguntas.

## ĜENERALA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 23-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri spezoj de la jaro 2013.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2014.
4. Renovigo de la estraro.
5. Diversaj sciigoj.
6. Proponoj kaj sugestoj.

## LOKE ...

## FORPASIS.



**Don Alberto García Orive**

Esperantista • Viudo de doña Matilde García de la Torre Arín

Falleció en Bilbao el día 13 de marzo de 2014, a los 82 años de edad.
Sus hijos, Pilar, Amaya y Joseba; nieta, Jugatx.

**La despedida se realizará en la intimidad familiar.**

**SALA VELATORIO: Tanatorio de Funeraria Bilbaína (Avda. Zumalakarregui, nº 10), de Bilbao.**

Funeuskadi Bilbao. Alda. Rekalde, 10. Bilbao. Tfno: 94 423 72 50

La 13-an de marto forpasis en Bilbao la membro de nia asocio **Alberto García Orive**. Aktiva esperantisto kaj poeto, en nia lingvo kaj en la hispana. Li ofte partoprenis E-aranĝojn kaj vojaĝis dise tra la tuta Eŭropo. Specialaj ligoj li havis al la Brusela E-Grupo, al Pola E-Asocio kaj al Latva E-Asocio. Certe li postlasas malplenon en la Grupo de Bilbao.

## COMIDA DE ANIVERSARIO DEL GRUPO.

Como ya comienza a ser tradición, el **sábado 24 de Mayo** celebraremos una comida para festejar el aniversario de la creación del Grupo (el 20 de Mayo hará 108 años). Estáis todos invitados, aunque deberéis **llamar, con antelación**, a cualquiera de los teléfonos que tenéis en la cabecera de esta circular.

La comida será en el restaŭrante “Izas Gork”, de Portugalete (calle Correos, 14). Precio: 12,75 euros. (metro: Portugalete. Salida Carlos VII). Familiares, amigos y simpatizantes también son, naturalmente, bienvenidos.

## CUOTAS DEL AÑO 2014.

Ya se puede pagar la cuota de socio correspondiente al año 2014. Cuanto antes se haga el pago, mayor será el beneficio para nuestra asociación.

Te recordamos que las cuotas, vigentes desde hace varios años, son:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## Intervjuo en « Radio Bilbao ».

La 15-an de majo, la sekretario de la E-Grupo de Bilbao, Jesús M. García, estis intervjuata en « Radio Bilbao ». La ĵurnalisto Jon Egaña Loroño demandis, dum duonhoro pri la kutimaj aferoj rilate al nia lingvo kaj al la historio de la E-Grupo.



*Bilbaoanoj partoprenintaj la Hispanan Kongreson de Ronda (Málaga), pozas ĉe la enirejo de la kongresejo apud du elstaraj poetoj : Miguel Fernández (dekstre) kaj Angel Arquillos (dua de maldekstre) ; Mariló, la edzino de Angel, la dua de dekstre.*

## E-aranĝoj .




**29. majo - 01 junio** Kongreso de Espéranto-France (UFE) - en Chambéry.
**06 - 09 junio** 91a Germana Esperanto-Kongreso - en Erfurt
**06 - 12 julio** 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio - en Rijeka, Kroatio
**12 - 20 julio** 7-a SES, Somera Esperanto-Studado – La 7-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en Slovakio, planita en urbo Nitra.
**18 - 25 julio** IJK - Internacia Junulara Kongreso - en Fortalezo, Brazilio
**26 julio - 02 aŭgusto** 99-a UK, Universala Kongreso de Esperanto - en Bonaero, Buenos Aires, Argentinio.
**09 - 16 aŭgusto** 87a SAT kongreso - en Dinano, Francio
**23 - 30 aŭgusto** 81-a Itala Kongreso de Esperanto - Suno kaj montoj - en Fai della Paganella, Trento
04 – **11 oktobro** 22-a internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Salou (Tarragona).
**25 julio - 01 Aŭgusto 2015** 100-a UK, Universala Kongreso - en Lille, Francio.

**H.E.F.**

## 73-a Hispana E-Kongreso.

De la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014, okais en Arundo-Ronda (Málaga) la 73-a Kongreso de Hispana E-Federacio. Du bilbaoanoj partoprenis ĝin.



*La du bilbaoanoj partoprenintaj la Hispanan Kongreson*



*La Sekretario de la E-Grupo de Bilbao (maldekstre) kaj la Prezidanto de HEF (dekstre) en Arundo.*



*Komuna foto de la partoprenintoj en la kongreso de Arundo-Ronda.*

## Rafaela Urueña prezentis sian libron "Eŭropa Unio, paŝon post paŝo", 

eldonita de Esperanta Jura Asocio, en la kadro de la 73a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 18a Andaluzia E-Kongreso samtempe okazintaj en Arundo (Ronda) de la1a ĝis la 4a de majo de 2014. http://youtu.be/1ax86yKpTo8

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 10/05/2014)*

## María Villalón en Esperanto.

La fama hispana pop-kantistino María Villalón koncertis por la partoprenantoj de la 73ª Hispana Kongreso de Esperanto. Ŝi prezentis du kantojn en Esperanto. Jen “La pluvo” (La lluvia): http://youtu.be/fOBkKcbJUAE

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 06/05/2014)*

## Mortintaj E-retpaĝoj.

Pasintan semajnon mi intencis viziti la retpaĝon kie devus troviĝi la interesa vortaro "Baza Esperanto Radikaro", de la nederlanda esperantisto Wouter F. Pilger (1942-2006).

En la STEB, de Eventoj, aperas ligilo por tiu verko, kiu kondukas al http://pilger.home.xs4all.nl/breo-au8.htm sed, ve, la paĝo aperas kiel netrovata. Kio okazis ? Tute simple, ke post la forpaso de la aŭtoro, neniu klopodis savi tiun valoran verkon, do, ĝi malaperis el la servilo uzita far Pilger.

Mi decidis surmeti la *uniformon de pirato - arkeologo*, kvazaŭ mi estus novspeca *Indiana Jones* :-)

Kaj mi trovis mirindegan retpaĝaron, kvazaŭ panteono, en kiu konserviĝas plurmilionoj da malaperintaj paĝoj: Internet Archive Wayback Machine. Ene de ĝi mi retrovis la malaperintan "Baza Radikaro de Esperanto".

Bonvolu legi mian artikoleton pri ĉi tio en Libera Folio en kiu mi pledas cele al tio, ke esperantaj organizoj klopodu savi paĝojn en risko de malapero pro forpaso de la aŭtoroj. Mi ege dankas al nia kara Kalle Kniivilä kiu bonvolis kompletigi ĝian redaktadon: http://www.liberafolio.org/2014/mortintaj-retpagoj-bezonas-urgan-savon

*(Darío Rodríguez. 23/04/2014)*

## La “alia” Iparraguirre.

Hieraû aperis en "GuadalajaraDiario.es" la jena komento:

“El 7 de mayo de 1889 fallecía en Guadalajara el doctor Fernández Iparaguirre, uno de los más brillantes intelectuales arriacenses del siglo XIX. Con este motivo, además de volverle a reponer sus gafas en la afortunada galería de hombres insignes de la ciudad que hay en el paseo que lleva su nombre, el Ayuntamiento le ha homenajeado con una recepción a su familia.

Francisco Fernández Iparraguirre fue uno de los intelectuales más preclaros de la ciudad de Guadalajara durante los años finales del siglo XIX y uno de los precursores del **Volapük**, un idioma de laboratorio que nació con vocación de convertirse en lengua universal, al estilo del **Esperanto.** Aunque ni una ni otra lengua acabaron alcanzando la universalidad, sí el concepto que alumbraban las ideas de Iparaguirre, quien creía que la unidad de la raza humana y el desarrollo del mundo pasaba por tener una herramienta común para comunicarse. El inglés se ha convertido cada vez más en el volapük del siglo XXI”.

*(Anthony Sarm Dom. 10/05/2014)*

## TRA LA MONDO …

## UKRAINIO. NENIAM MILITO INTER NI!.



Tiu rusa-ukrainia paro (la junulo montras sian rusan pasporton kaj la junulino sian ukrainian pasporton) respondas al la ambaŭflankaj naciistoj kiuj kondukas Ukrainion al sangelverŝado ardigante la naciismajn kaj rasismajn malamojn.

En Ukrainio, pro la konflikto inter frakcio de la direktanta klaso kiu rigardas al Bruselo kaj alia al Moskvo, disvolviĝas naciisma veneno, ukrainia kaj grand-rusa. Se en tiu naciisma histerio, la ordinaraj homoj, laboristoj, pensiuloj, dungitoj, terkultivistoj, senlaboruloj, ktp, parolantaj ĉu la rusa, ukrainia aŭ alia lingvo, havas ĉion por perdi, la minoritatoj, ĉefe Romaoj kaj judoj, estas aparte minacataj, kaj tio en la nomo de ambaŭflankaj naciistoj.

Dum flanke de ukrainia naciismo, oni vidas defiladi grupojn malkaŝe naziajn kaj nostalgiajn de la kontraŭjuda estro *Bandera*, en *Donecko*, urbo sub kontrolo de grand-rusaj naciistoj, flugfolioj invitantaj Judojn enregistriĝi kaj listigi ĉiujn bienojn kiujn ili posedas estis disdonitaj en la urbo. Tiuj flugfolioj ordonas al la judoj aĝaj pli ol 16-jaraj enlistiĝi kaj deklari ilian heredaĵon, en la risko kontraŭokaze je elpelado kaj konfisko de iliaj bienoj. La flugfolio, disdonita ĉe la elirejo de sinagogo, enhavas la flagon de la Suverena respubliko de *Donecko* sub grand-rusa naciisma kontrolo. La separatisma estro, *Denis Pouŝiline* dementis sian implikon en tiu afero, denuncante krudan falsaĵon. Ĉu temas pri kreado de grand-rusaj naciistoj aŭ falsaĵo produktita de ukrainiaj naciistoj, tiu kontraŭjuda provoko klare montras la minacojn kiujn prezentas la naciisma histerio en Ukrainio kiel aliloke. (*26/04/2014*)

## Pri lingvoj … Ĉu vero?

Vaste oni kredas, ke la franca estas logika, la araba netradukebla, la hispana facile lernebla, la dana stranga, la itala belsona, la angla praktika, demokratia kaj seksisma, la hebrea sankta, la bengala kultura kaj Esperanto neŭtrala. Ĉu tio estas vero? http://languagequality.blogspot.jp/

(Etsuo Miyoŝi. 09/05/2014)



## **Esperanto en la eŭropa balotado**.

La verduloj aktuale estas minoritataj en Hispanio, sed en Eŭropo estas la kvara plej grava partio. Kiam mi loĝis en Irlando, mi observis, ke multaj esperantistoj estis verduloj (kiel Christopher Fettes, kiu fakte estas la fondinto de la Irlanda Verda Partio). Tie mi alproksimiĝis al la verda politiko pere de esperanto.

Fakte, mi nun estas politike aktiva verdulo ĉe Equo (la nura hispana partio, kiu apartenas al la Eŭropa Verda Partio, ĉiulande krom en Katalunio, kie aktivas ICV). Mi parolas ofte pri esperanto al aliaj hispanaj verduloj, kaj mi eĉ instruetis kelkajn bazajn lecionojn al interesitoj. Bedaŭrinde, mi ne sukcesis inkludi esperanton en la eŭropa programo, sed mi pensas, ke Equo estas inter la partioj, kiuj plej facile subtenos nian lingvon, pro tio, ke la lingva diverseco estas, samkiel la biologia diverseco, tre grava principo.

Mi estis unu el la kandidatoj de Equo en la pasinta 2011-jara nacia balotado, sed mi ne estos kandidato por la eŭropa balotado. Mi tamen bone konas la ĉefan kandidaton de Equo, Florent Marcellesi (kiu estos la dua kandidato de la koalicio Primavera Europea), kaj mi persone petos al li, ke, se li estas elektita, li konsideru subteni esperanton kun la verduloj de la aliaj landoj (li mem estas ekzemplo de lingva diverseco: franculo, korsikdevena, delonge loĝanta en eŭskio kaj lernante la eŭskan kaj la hispanan).

*(Marco Trevisan. 07/04/2014)*

## **Enretigo de "Scienca Revuo"**.

La Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) ĵus havebligis ampleksan arkivon de sia periodaĵo /Scienca Revuo/.

Ekde nun haveblas senpage en la Interreto pli ol 60 jaroj de arkivaĵoj, t.e. ĉirkaŭ 2000 artikoloj kiuj aperis dum la jaroj 1949-2014. Aperintaj artikoloj estis skanitaj kadre de kunlaboro inter ISAE kaj la Interkultura Centro Herzberg (ICH, http://ic-herzberg.de). Ilin haveblas en PDF-formo laŭ la permesilo CC BY-ND. Serĉilo en la retejo ebligas al oni trovi artikolon laŭ ekzemple verkanto de la artikolo aŭ titolo. La arkivo atingeblas per la sekva ligilo: https://scienca-revuo.info/issue/archive

Eldonita de ISAE, Scienca Revuo estas grava kaj tradicia periodaĵo priscienca en Esperanto. Ĝi publikigas sciencajn artikolojn en Esperanto, kovrantajnĉiajn fakojn kaj flanke de la scienca enhavo ankaŭ enhavas sekcion pri terminologio, pri scienco kaj socio kaj pri la rilato inter scienco kaj Esperanto. Scienca Revuo aperas ekde 1949 kajestasdaŭrigo de revuo fondita en 1904 kiel Internacia Scienca Revuo.

ISAE fondiĝis en la jaro 1906 kaj estas la unua esperantlingva asocio, en kiu fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj, profesiaj aŭ amatoraj, kaj interesatoj pri sciencaj aferoj unuiĝis al mondvasta scienca asocio, uzantajla internacian lingvon Esperanto en scienco kaj teĥniko. Ekde 2013 ISAE estas oficiale registrita kiel asocio ĉe la Nederlanda komerca ĉambro, kun sidejo en Roterdamo.

ISAE daŭre serĉas verkantojn kaj prov-legantojn por diversaj fakoj. Kiu emus fake verki aŭ alimanieresubteni la scienca agadon de la asocio vizitu la paĝon: https://scienca-revuo.info/about/journalSponsorship

(*La Estraro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). /José Antonio Vergara (CL)/Johannes Mueller (DE)/Mélanie Maradan (CH)/Francesco Maurelli (UK)/Alga Guernieri (IT*). *27/04/2014*)

## Planedo Marso, Esperante.

Kunlabore kun NASA kaj Universitato de Arizono ekfunkciis nova retejo en Esperanto kiu montradas sinsekvajn pejzaĝojn de la planedo Marso, prenitaj per la fotilo Hirise: http://beautifulmars-esperanto.tumblr.com/

*(Darío Rodríguez. 08/04/2014)*

## Urĝas varbi membrojn!

(UEA) … Ĝis la 1-a de majo estis registritaj 4295 individuaj membroj. Tio estas nur 31 pli ol samtage en 2013. Se la alfluo de (re)membriĝoj ne kreskos sufiĉe dum la venontaj monatoj, UEA riskos ankaŭ ĉi-jare ne havi pli ol 5000 membrojn. Pasintjare la fina nombro estis 4903.

La evoluo estas tre malsama laŭ kotizkategorioj (parenteze la diferenco kompare kun 1 majo 2013)):

Membro kun Gvidlibro 350 (+71), Juna MG 19 (-1), Membro kun Jarlibro 992 (-76), juna MJ 182 (+36), Membro-Abonanto 1706 (-39), juna MA 62 (+4), Dumviva Membro 778 (+3), juna DM 14 (+2), DM kun Jarlibro 125 (+29), juna DMJ 15 (+2), Honora Membro 46 (sama), Honora Patrono 6 (sama).

Mi ne komentas la unuopajn evoluojn krom konstati kun ĝojo la kreskon de junaj membroj kaj kun bedaŭro, ke el la renovigo de "Esperanto" ne sekvis kresko de MA-membroj. En jaro de malgranda UK la falo ne estas surpriza, precipe kaze de MJ, sed kiel montras la ekzemploj sube, tio ne estas neevitebla naturleĝo.

Du estraranoj elstaras. Lee Jungkee pli ol duobligis la membraron en Korea Respubliko. Pasintjare la definitiva nombro tie estis 52, sed ĝis nun jam 109 koreoj estas registritaj kiel membroj de UEA por 2014. Martin Schäffer celas atingi similan proporcian kreskon en Meksiko, kie pasintjare estis 19 membroj kaj ĉi-jare jam 34.

Elstaras ankau Trezoro Huang Yinbao, nia nova peranto en Ĉinio kaj membro de la Konsilio de UEA. Li peris jam 51 kotizojn, ĉefe de novaj membroj. Tio estas plia pruvo, ke indas havi pli ol unu peranton en sama lando. Mi ofte plendis, ke iuj perantoj prenas sian taskon tro laŭvorte: ili peras al la CO la kotizojn, kiuj venas al ili. Tio tamen estas nur la lasta parto de ilia laboro. Antaŭ ĉio ili devas varbi.

*(Osmo Buller. Ĝenerala Direktoro de UEA. 02/05/2014)*

## 33.000 subskriboj por Esperanto ĉe franca abiturienta ekzameno.

En 2011-2012 la francaj Esperanto-asocioj SAT-Amikaro kaj Espéranto-France kolektis pli ol 33.000 subskribojn al petskribo, ke Esperanto estu akceptata kiel nedeviga fako por abiturienta diplomo.

En Francio fine de la mezlernejo, 18-jaruloj trapasas ekzamenon kun maksimume tri lingvaj fakoj, devigaj kaj nedevigaj. Inter la nedevigaj estas elekteblaj sesdeko da lingvoj, kelkaj por parola ekzameno, sed plimulto por skriba ekzameno. La francaj samideanoj petas, ke Esperanto estu akceptata por skriba ekzameno, t.e. teksto 30-linia en la fremda lingvo, pri kiu la kandidato respondu kvar demandojn, verku kelkajn liniojn de “persona esprimo” kaj traduku al la franca dekon da linioj, entute dum du horoj. La nivelo estas inter B1 kaj B2.

*(Lingvo-Studio / Szilvasi Laszlo. 07/04/2014)*